

GOTOO Hitosi

Tohoku University, Sendai, Japanio / Japan

Recenzo de la libro

Kimura, Goro Christoph. 2021.

***Igengokan komyunikesyon no hoho: baikaigengo wo meguru giron to zissai* [Metodoj de interlingva komunikado. Teorio kaj praktiko de vehiklaj lingvoj]. Tokyo: Taishukan.**

La aŭtoro celas per ĉi tiu libro prilumi diversajn aspektojn de interlingva komunikado, ĉefe direktante sin al kleruloj kaj universitataj studentoj en Japanio, kie en komunikado kun alilingvuloj la uzo de la angla estas ofte konsiderata kiel la memevidenta elekto.

En la antaŭparolo la aŭtoro atentigas, ke la plimulto de la homaro ne parolas la anglan, kaj interlingvaj komunikadoj okazas ne nur en internaciaj organizoj kaj konferencejoj, sed pli ofte en ĉiutagaj lokaj vivoj de popoloj, kaj ili uzas diversajn rimedojn krom la uzo de la angla, ekzemple la helpon de interpretado aŭ la lernadon/uzadon de iu alia fremdlingvo. Eĉ anglaparolantoj ne malofte uzas aliajn rimedojn laŭ siaj avantaĝoj en situacioj.

Troviĝis ja esploroj pri tiaj rimedoj sed tiuj studoj plej ofte temis nur pri unuopaj rimedoj: en la sfero de la anglalingvaj koncernatoj (interalie esploristoj kaj instruistoj) produktiĝis sennombraj studoj pri anglalingva komunikado kun la antaŭsupozo ke la angla estas la internacia lingvo, kaj la koncernatoj pri interpretado okupiĝas pri studoj de interpretado substrekante ĝian gravecon. Tie mankis eĉ ĝenerala bildo de la eblaj rimedoj kaj komparo de iliaj trajtoj. Ŝtopi tiun mankon, jen estas la motivo de la aŭtoro.

Kiel la subtitolo sugestas, la libro konsistas el du ĉefaj partoj kaj konkludo krom 14 paĝoj da bibliografio. La unua parto, titolita “diversaj strategioj de interlingva komunikado: el diskutoj en Eŭropo”, traktas teoriajn aspektojn. Aliflanke, la dua parto “praktiko de interlingva komunikado: el esploroj ĉe la german-pola landlimo” prezentas diversajn metodojn efektive uzatajn en la menciita regiono kaj analizas ilin laŭ la teoria skemo.

En la unua parto, surbaze de ĝisnunaj diskutoj ĉefe en Eŭropo, la aŭtoro unue prezentas ĝeneralan idean skemon de strategioj de interlingva komunikado. El la vidpunkto de ĉiu el la du (aŭ pliaj) flankoj de interlingva

komunikado, la interlingvo(j) povas esti (1) ties propra lingvo, (2) lingvo de la alia flanko, (3) aldona lingvo aŭ (4) lingvomiksado. Ekzemple, ĉiu el la du flankoj povas uzi sian propran lingvon, se ĉiu havas kapablon kompreni la lingvon de la alia, aŭ se intervenas lingva perado kiel interpretado. Povas esti, ke ĉiuj flankoj uzas ies propran lingvon, kiu estas fremda lingvo por alia(j) flanko(j), aŭ ĉiu flanko uzas la lingvon de iu alia, ne uzante sian propran.

Povas esti uzata aldona lingvo. Ofte temas pri unusola interlingvo (ekzemple la angla aŭ Esperanto), sed povas esti pluraj aldonaj lingvoj. Aldona lingvo povas esti uzata kune kun supraj rimedoj, nome en diversaj kombinoj kun la lingvo de iu partoprenanto de la komunikado k.t.p. La aŭtoro prezentas tiun skemon kiel teoriaĵon, sed aldonas, ke ĉiuj eblaj kazoj estas efektive observataj en lia laborejo, nome la Fakultato pri Fremdaj Lingvoj kaj Studoj de Sophia-Universitato en Tokio.

En sekvaj ĉapitroj la aŭtoro pli konkrete kaj detale pristudas unuopajn strategiojn koncerne iliajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn, citante rilatajn opiniojn favorajn kaj malfavorajn al iuj rimedoj. Jen kelkaj el la traktataj strategioj: la angla kiel fremda lingvo (EFL) kaj la angla kiel lingvafrakao (ELF), Esperanto, multlingvismo kaj plurlingvismo, interpretado kaj tradukado (inkluzive de maŝina traduko), riceva multlingvismo, kaj kombino/mikso de strategioj. En EFL la celo estas proksimigi la lernanton al la modelo de denaska anglaparlanto, dum en ELF substrekata estas laŭokaza kaj surloka komprenebleco senkonsidere al konvenciaj normoj de la angla. La aŭtoro traktas multlingvismon lige kun la lingvopolitiko de EU, kiu substrekas la kunekziston de pluraj lingvoj en iu socio aŭ organizo, dum plurlingvismon lige kun tiu de la Konsilio de Eŭropo, kiu pli celas al plurlingva kapablo kaj aktivado de individuoj. En riceva multlingvismo ĉiu flanko uzas sian propran lingvon kaj riceve (t.e. aŭde kaj lege) komprenas la lingvon de aliulo. Fine de la unua parto, la aŭtoro pledas por pli pozitiva takso de kodŝanĝado kaj lingvomiksado.

En la dua parto “praktiko de interlingva komunikado: el esploroj ĉe la german-pola landlimo,” la aŭtoro prenas la nomitan regionon por ilustrati la diversajn strategiojn de la teoria skemo. Konata kiel la Odro-Niso-limo, la nova landlimo post la dua mondmilito, kiu kuras de nordo al sudo laŭ la riveroj Odro kaj Niso, estis markita multe pli okcidente ol la antaŭmilita landlimo. Por stabiligi la landlimon, la germandevena loĝantaro en la regiono estis devigita transloĝi okcidenten en la novan germanan teritorion, kaj en la novan polan teritorion transloĝis pola loĝantaro.

La german-pola landlimo tial estas la plej granda socilingvistika fendo, kie parolantaroj de reciproke nekompreneblaj lingvoj loĝas unu apud la alia trans la rivero. Dume Germanio kaj Pollando nun estas EU-anoj ene de la

ŝengena zono kaj ĉiutagaj translimaj rilatoj (aĉetadoj, turismadoj, laboroj ktp.) estas densaj. Por komuniki kun alilingvanoj la loĝantoj elpensis kaj ekuzis diversajn rimedojn.

La surterena esploro estis plenumita ĉefe en 2012-2013 en la “duobla urbo,” Frankfurt an der Oder kaj Słubice, kiu situas en la mezo laŭ la landlimo kaj en efektiveco konsistigis unu urbon antaŭ 1945. En la enketado la aŭtoro observis ĉiujn teorie eblajn strategiojn, kaj li priskribas en kiuj situacioj estas uzataj kiuj strategioj.

En la priskribado la aŭtoro distingas inter ĉefaj kaj alternativaj strategioj. La unuaj inkludas la uzon de la germana kaj tradukadon/interpretadon. En la dua kalkuliĝas la uzo de la pola, neuzo de la propra lingvo, riceva du-lingvismo, kaj eventuala uzo de mikslingvo “Poltsch” (el *polski* kaj *Deutsch*) kaj la uzo de Esperanto.

En la konkludo la aŭtoro unue resumas la ideajn trajtojn de strategioj kaj atentigas, ke ĉiu strategio havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Li do proponas, ke oni komprenu la trajtojn de diversaj strategioj kaj adekvate uzu malsamajn strategiojn en malsamaj situacioj. La aŭtoro levas demandon, ĉu el Eŭropo eblas tiri instruojn utilajn al Japanio, kaj mem respondas pozitive, por fine proponi, ke en lingvoinstruadon estu enkondukitaj respektado kaj flegado de diversaj strategioj de interlingva komunikado.

Ĉi tiun libron karakterizas profunda kaj vasta perspektivo de la aŭtoro kaj riĉaj referencoj al antaŭaj studoj kaj argumentoj. Ĝi espereble fariĝos la deirpunkto por estontaj seriozaj diskutoj en Japanio, kie ofte dominas naiva anglalingvismo.

Referencitaj studoj kaj prezentitaj konkretaj kazoj venas ĉefe de Eŭropo, kio estas tute pravigebla kaj sufiĉe komprenebla elekto el la persona historio kaj esplora kariero de la aŭtoro. Sed interlingvaj komunikadoj okazas ankaŭ en Japanio (eĉ se ne tiel dense kaj ofte kiel en la laborejo de la aŭtoro) kaj japanaj ilustraj kazoj argumenteble povus helpi komprenon de legantoj.

Ĉar la diferenco inter lingvo kaj dialekto estas fojfoje fajna kaj nedeterminebla sen referenco al politiko, oni certe rajtas koncepti ankaŭ pri “metodoj de interdialekta komunikado”. Nu Japanio estas tradicie riĉa je dialektoj, kvankam junaj generacioj tendencas uzi malpli. Kodŝanĝado kaj dialektomiksado estas observataj sufiĉe ofte kaj jam fariĝis temo de sciencaj studoj. Ĉi tiu libro povos utili al studoj en tiu kampo, donante al ĝi teorian bazon. Ankaŭ la aŭtoro supozeble ricevos ian utilan ideon el la studoj de dialektoj.

Pri la recenzanto

GOTOO Hitosi, nask. 1955, estis ĝis 2021 profesoro pri lingvistiko ĉe la Universitato Tohoku, Sendai, Japanio, kaj nun emerita profesoro. Okupiĝas pri ĝenerala lingvistiko, romanistiko, korpus-lingvistiko, historio de lingvistiko kaj esperantologio. Aŭtoro de *Kultura historio de Esperanto laŭ personoj* (JEL, 2015). Kunredaktinto de *Esperanto-Japana vortaro* (JEL, 2006), *Biografia leksikono de la Esperanto-movado en Japanio* (hituzi syobô, 2013) kaj *En la mondon venis nova lingvo: festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins* (Mondial, 2018).

Retadreso: gothit@tohoku.ac.jp

About the reviewer

GOTOO Hitosi, born in 1955, was a professor of linguistics at Tohoku University, Sendai, Japan until 2021, and now professor emeritus. Specialized in general linguistics, Romance linguistics, corpus linguistics, history of linguistics and Esperanto studies. Author of *Kultura historio de Esperanto laŭ personoj* [Cultural History of Esperanto through people] (JEL, 2015). Coeditor of *Esperanto-Japana vortaro* [Esperanto-Japanese Dictionary] (JEL, 2006), *Biografia leksikono de la Esperanto-movado en Japanio* [Who was who in the Esperanto Movement in Japan] (hituzi syobô, 2013) and *En la mondon venis nova lingvo: festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins* [Into the World Came a New Language: Festschrift in Honor of the 75th Birthday of Dr. Ulrich Lins] (Mondial, 2018).

評者について

後藤 斉(1955年生)は、2021年まで東北大学教授(言語学)、現在は名誉教授。研究分野は一般言語学、ロマンス語学、コーパス言語学、言語学史、エスペラント学。著書に『人物でたどるエスペラント文化史』(日本エスペラント協会, 2015)。共編書に『エスペラント日本語辞典』(日本エスペラント学会, 2006)、『日本エスペラント運動人名事典』(ひつじ書房, 2013)、*En La Mondon Venis Nova Lingvo. Festlibro Por La 75-Jariĝo de Ulrich Lins* (Mondial, 2018)。